N. N. 01,

La Nikolao-kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Gajaj estu ĉiuj ni,
ĝoju ni pri nia Di'!
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Baldaŭ venos Nikola'!

Dum la nokto venos li,
la teleron metas mi.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Baldaŭ venos Nikola'!

Kaj dormante sonĝas mi:
Dolĉajn aĵojn donas li.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Venas Sankta Nikola'!

Ekstarinte vidas mi,)
ke jam venis tiu ĉi.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Venis Sankta Nikola'!

Ĉiuj devas danki lin,
ĉar li regalegis nin.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Venis Sankta Nikola'!

Traduko de la Germana poemo "Das Nikolauslied" de N. N. 01 en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-93-189 (2003-12-10 22:20:06)